# *Raúl Castro akceptis la prezidenton de Kolombio en Havano.*



Havano, 17 (jul) La kuba prezidento kaj generalo de armeo, Raúl Castro, akceptis  la kolombian prezidenton Juan Manuel Santos per ceremonio oficiala en la Palaco de la Revolucio, kaj poste amba? efektivigis oficialan  dialogon.

Iom anta?e, Santos oma?is per florbukedo la nacian heroon José Martí en la  memorialo de la Placo de la Revolucio, akompanate de la kuba vicministro pri eksteraj rilatoj Rogelio Sierra.

Matene, Santos partoprenis forumon de negocistoj okazinta en la Hotelo Nacional de Kubo, kaj esprimis sian celon danki la decidan subtenon de Kubo al la paca procezo de sia lando, kaj anka? fortigi la komercajn kaj ekonomiajn ligojn kun la kariba insulo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/135797-raul-castro-akceptis-la-prezidenton-de-kolombio-en-havano

**Radio Habana Cuba**